

7
07

The American Esperanto Journal

OFFICIAL MAGAZINE OF THE
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

ESPERANTO

AUXILIARY



LANGUAGE

INTERNATIONAL

Copyrighted, 1907, by the American Esperanto Association

Vol. I

MAY, 1907

No. 5

The American Esperanto Association

(Founded 1905.)

Honorary President—Dr. L. Zamenhof.

President—Prof. G. B. Viles, Ohio State University.

Secretary—John Fogg Twombly, Boulevard Station, Boston, Mass.

Treasurer—Stephen W. Travis, Jr., Tenafly, N. J.

Publication office of the American Esperanto Journal, 34 Green St., Brookline, Mass.

The American Esperanto Association exists for the following purposes:

- 1) To furnish information about Esperanto.
- 2) To provide students with proper books.
- 3) To provide certificates of proficiency in the language.
- 4) To publish the American Esperanto Journal.
- 5) To unite with one another individual Esperantists and, especially, the Local Esperanto Societies.

Membership in the Association, including a year's subscription to the American Esperanto Journal, \$1.50.

AFFILIATED ORGANIZATIONS:

Help us and help yourselves by becoming affiliated with the American Esperanto Association. This will cost you only \$2.00. You will receive a year's subscription to the American Esperanto Journal, and the name of your society, the name of your President, and the name and address of your Secretary will appear regularly on the cover of the Journal. Send the necessary information and money to the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass.

Massachusetts Agri. College Esperanto Club, E. Victor Bennett, 25 No. College, Amherst, Mass.
Boston Esperanto Society, Edw. K. Harvey, Perkins Institution, South Boston, Mass.
Esperantaj Pioneroj, Aaron D. Wolpe, Perkins Institution for Blind, South Boston, Mass.
Brooklyn Esperanto Society, Durbin Van Vleck, 148 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
Cantibrigia Esperanto Group, Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
Harvard Esperanto Society, H. R. Shepherd, 69 Dana St., Cambridge, Mass.
Esperanto Club of Chicago, C. E. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago, Ill.
Leibnitz Esperanto Club, Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
Univ. of Chicago Esperanto Society, Floyd B. Hardin, Middle Div. Hall No. 37, Chicago, Ill.
Esperanto Club of Ohio State Univ., Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.
Elgin Esperanto Group, Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.
Everett Esperanto Club, Mrs. F. F. Driscoll, 161 Cottage St., Everett, Mass.
Esperanto Society of Los Angeles, Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
Kansas State Agri. College Esperanto Club, Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.
New Britain Esperanto Club, Rolland B. More, P. O. Box 700, New Britain, Conn.
New York Esperanto Society, Stephen W. Travis, Jr., Lock Box 8, Tenafly, N. J.
Jamestown Esperanto Club, Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
First Nebraska Esperanto Club, Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.
Emory Esperanto Club, Ralph M. McGhee, Emory College, Oxford, Ga.
Philadelphia Esperanto Society, Lewis B. Lueders, 206 S. 41st St., Philadelphia, Pa.
San Diego Esperanto Society, C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.
Searchlight Esperanto Club, Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.
Seattle Esperanto Society, Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.
St. Louis Esperanto Club, Mrs. Meade C. Dodson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.
Winona Esperanto Club, Rev. J. J. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.
Worcester Esperanto Society, Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
Portland Esperanto Society, Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.
Esperanto Club of Rockland, Chas. Froding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.
Columbus Esperanto Society, M. Janet Rogers, 403 Luckhaupt Ave., Columbus, Ohio.
L'Espero Esperanto Club, Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Maine.

The American Esperanto Journal

Vol. I.

MAY, 1907

No. 5

THE American Esperanto Journal is the official organ of the American Esperanto Association, and of the local Esperanto societies in Boston, Chicago, New York, Philadelphia, Los Angeles, Seattle, etc. It appears once a month, and will aim to be especially useful to beginners.

All writers to the Journal must observe the following rules:

1. Write legibly or, preferably, "type-write."
2. Use paper as large as that of the Journal.
3. Write only on one side of the sheet.
4. Leave large spaces between the lines.
5. Always send an English translation on separate sheets of paper.

The Editors reserve the right to correct and to reject all manuscripts. No manuscripts will be returned except in the case of articles rejected, and only then, when such articles exceed 500 words in length, and are accompanied by return postage.

The American Esperanto Journal is a "propaganda organ." The editors and other workers on it give freely of their time and labor; writers of articles must do likewise.

Address articles to the REDAKTORO, AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Boulevard Station, Boston, Mass. News articles should be addressed to the REDAKTORO DE KRONIKO.

AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

With membership in the American Esperanto Association.....\$1.50
Journal alone..... 1.00

According to the English proverb facts speak louder than words. Esperantists should remember this when they hear arguments against our language, even when the opponents of it are famous and learned men. Every man has his own prejudices, and many well-educated persons cannot see anything good in a new discovery. Moreover, one who knows a great deal in his own department often does not know much outside of it; sometimes he is not acquainted with facts which can be easily obtained even by the ordinary man,—the so-called "man in the street."

For example, a professor in one of our universities was asked not long ago for information about the Esperanto movement. He replied that this movement seemed to be making progress in France, but that it was dying out in the United States. Now, the truth of the matter is this, the number of persons in our country who are actually interested in the language is now ten times what it was a year ago. We know what we are talking about, for we can judge from realities, from letters received, from books sold, from subscriptions to the JOURNAL. We have, for instance, a thousand subscriptions, the money for which we have already received; a year ago we would not have been able to get a hundred. Then there were five or six societies in existence; now there are fifty.

Laŭ la angla proverbo faktoj parolas pli laŭte ol vortoj. Tion ĉi Esperantistoj devas memori, kiam ili aŭdas kontraŭdirojn kontraŭ nia lingvo eĉ kiam la kontraŭparolantoj estas famaj kaj kleraj viroj. Ĉiu homo havas siajn proprajn antaŭjuĝojn, kaj multaj personoj bone edukitaj ne povas vidi ion bonan en nova eltrovo. Plie, viro tre klera en sia propra fako de scienco ofte ne scias multon ekstere de tiu fako: iam li ne konas faktojn facile troveblajn eĉ de la ordinara homo,—la tiel nomata "homo en la strato."

Ekzemple, al profesoro en unu el niaj universitatoj antaŭ ne longe oni demandis sciigon pri la Esperanta movado. Li respondis, ke tiu ĉi movado ŝajnas progresadi en Francujo, sed ke ĝi ekmortigas en la Unuigitaj Ŝtatoj. Nun, la vero de la afero estas jene: la nombro da personoj en nia lando kiuj efektive interesigas pri la lingvo estas nun dekoble pli granda ol ĝi estis antaŭ unu jaro. Ni scias pri tio, ĉar ni povas juĝi per realaĵoj, per leteroj ricevataj, per libroj venditaj, per abonpagoj al nia ĵurnalo. Ni havas ekzemple mil abonojn, de kiuj ni jam ricevis la monon: antaŭ unu jaro ni ne povus esti ricevintaj cent. Tiam ekzistis kvin aŭ ses grupoj: nun ekzistas kvin dek.

Why, then, did the professor make such a mistake? Simply because he did not take the trouble to learn about the facts: he only *guessed*, and guessed naturally in accordance with his prejudices and desires. There are other dreamers besides Esperantists.

This same professor also said that French must continue to remain the language of diplomacy. Why? Was it always thus? Before 1650 A. D. Latin was used for this purpose; and for the same reason that Latin was replaced two centuries and a half ago by French, perhaps French in its turn will also be replaced by another language,—is it too presumptuous to say by a truly international one?

According to Mr. Witte, French was not a great success at the Portsmouth Conference. Moreover, in a congress of Japanese Esperantists which met not long ago, a letter was read from the famous Japanese diplomat, Baron Hayashi, ex-ambassador to Great Britain, and now Minister of Foreign Affairs, in which letter this distinguished man demanded the introduction of an international language into diplomacy.

At the same congress a letter written by the vice-president of one of the Japanese chambers of commerce, Sro. Ikeda Kerio, was read. This gentleman pointed out the practical uses of Esperanto in international commercial relations.

Esperanto, then, is making progress not only in France, but also in the United States and in Japan. In the United States we rely only on facts, on realities in our hands. Naturally, for Japan we, for the most part, must trust to reports. But fortunately even in regard to that land we have something more substantial: we have just received a practical proof of the real worth of Esperanto there in the shape of a fable translated by Sro. E. Asada. We have reprinted it just as we received it. Our readers will be able to read and understand it easily: in the whole story there are only a few small errors.

Kial do povis tiu profesoro tiom erari? Nur ĉar li ne klopodis sciigi pri la faktoj: li nur *divenis*, kaj divenis kompreneble laŭ siaj antaŭjuĝo kaj volado. Estas krom la Esperantistoj aliaj revantoj.

Tiu ĉi sama profesoro ankaŭ diris ke la franca lingvo devos daŭri kiel la lingvo de diplomatio. Kial? Ĉu ĝi ĉiam estis tia? Antaŭ 1650 A. D. oni uzadis la latinan por tiu ĉi; kaj pro la sama kaŭzo, pro kiu la latina estas anstataŭigita antaŭ du kaj duonaĵ centjaro, oni eble anstataŭigos la francan per alia lingvo,—ĉu estus tromemfidema diri per vere internacia?

Laŭ S-ro. Witte, la franca ne taŭgas bone ĉe la Portsmoutha Konferenco. Plie en kongreso de japanaj esperantistoj kunvenitaj antaŭ ne-longe oni legis leteron skribitan de fama japana diplomato Hajaŝi, eks-ambasadoro al Granda Britujo kaj nun Ministro de Aferoj Fremdaj, en kiu letero tiu ĉi distingiginta viro postulas la enkondukon de internacia lingvo en diplomatio.

En la sama kongreso oni ankaŭ legis leteron skribitan de vicprezidanto de unu el la japanaj komercaj ĉambroj,—S-ro. Ikeda Kerio, kiu montris la praktikajn utilojn de Esperanto en internaciaj komercaj rilatoj.

Esperanto do progresadas ne nur en Francujo, sed ankaŭ en la Unuigitaj Statoj kaj en Japanujo. En la Unuigitaj Statoj ni alfidas nur al faktoj, al realaĵoj en niaj manoj. Kompreneble pri Japanujo ni plejparte devas alferi al raportoj. Sed bonsorte eĉ pri tiu lando ni havis ion pli bonan: ni ĵus ricevis praktikan pruvon de la efektiva taŭgeco de Esperanto tiea en la formo de fable tradukita de S-ro. E. Asada. Ni represigis ĝin ĝuste kiel ni ĝin ricevis. Niaj legantoj povos facile legi kaj kompreni ĝin; en la tuta rakonto estas nur malmulte da malgrandetaj eraroj.

ONI NE POVAS INTERPAROLI PER SI MEM

“Por la interparolado la praktiko estas necesa. Tie-ci montriĝas la graveco de grupoj aŭ kursoj, kie oni povas paroli la lingvon, kaj ankaŭ aŭdi kiel ĝi sonas kiam aliaj personoj ĝin elparolas. Oni povas pli rapide akiri la kapablon paroli Esperanton ol la kapablon paroli ian ajn vivan lingvon nacian; sed, mi ripetas, *estas necese praktiki*.

Ni devas do formi ĉie klubojn aŭ klasojn, kies anoj devas studi hejme per si mem, tiam kunveni ĉiusemajne por ricevi praktikon interparolante kune en la lingvo.”

Elĉerpitaĵo el parolado pri Esperanto de
Pro. G. B. Viles, Ohio State University.

ESPERANTO IN COMMERCE

Esperanto is now beginning to be recognized by the commercial interests of the country. In discussing the need of an international language in a recent issue of *The Financier*, a financial magazine published in New York, and perhaps one of the most important of its kind in the United States, the editor said, among other things:

"The majority of American houses to-day rely on bright young foreigners to conduct international correspondence, and many interests, despairing of the difficulty of securing and holding really efficient help, have abandoned promising fields and turned their attention wholly to domestic trade, already suffering from over-competition.

"It is a matter of congratulation, therefore, that a really useful, comprehensive and satisfactory neutral language is coming into use. We refer to Esperanto, which is being widely taught and adopted in Europe and in the Orient. *It is anticipated that in four or five years the commercial world will be using Esperanto universally.*"

(From a public speech on Esperanto delivered by Mr. John F. Reihl, Seattle.)

Esperanton oni nun komencas rigardi inter la komercistoj en nia lando. Parolante pri la bezona de internacia lingvo en unu el la lastaj numeroj de la *Financier*, financa jurnalo eldonata en New York, kaj eble unu el la plej gravaj de ĝia speco en la Unuigitaj Ŝtatoj, la redaktoro skribis, inter aliaj aferoj, la jenan:

"La plimulto da Amerikaj firmoj hodiaŭ fidas al lertaj junaj fremduloj por la internacia korespondado, kaj multaj firmoj, mal-esperante pri la malfacileco kapti kaj gardi efektive bonajn helpantojn fremdajn jam forlasis promes-plenajn kampojn kaj turnisian atenton entute al hejmlanda komerco, jam suferanta de tro multa konkursado.

Estas afero gratulinda do ke efektive utila plenega kaj kontentiga neŭtrala lingvo komencas utiliĝi. Ni parolas pri Esperanto, kiun oni preskaŭ ĉie instruas kaj alprenis en Eŭropo kaj en la Oriento. Estas antaŭvidate, ke post kvar aŭ kvin jaroj la komerca mondo uzados Esperanton ĉie."

AMERICAN DELEGATE TO BLIND ESPERANTIST CONGRESS

Prof. Cart, of Paris, editor of "Esperanta Ligilo," and a fervent believer in the utility of Esperanto among the blind, has arranged with the British samideanoj to hold, in connection with the main Esperantist Congress in Cambridge, a convention of blind Esperantists from all over Europe. It is expected that over fifty will be present from eight or ten nationalities. Interested friends in each country are helping to meet the expenses of the journey, and the British committee will receive the delegates as their guests during the week of the convention. Prof. Cart and the committee in charge of the affair do not dream of having an American representative present—the distance is too great and Esperanto among the Americans is too young. But an ambitious young man in Massachusetts thinks otherwise.

He has studied Esperanto over two years, has corresponded largely with foreign samideanoj and is able to speak the language fairly well. He has succeeded in raising half his expenses himself, and by various means is trying to earn and save the rest. *He does not know that this appeal is to be made.*

To no other class of persons does Esperanto promise so much blessing as to the blind. The enormous size and consequent cost of the raised print text-books makes it impossible for them to study modern languages. The success of this young man abroad would mean much for the spread of Esperanto among the thousands of American blind. *Will you help?*

Any sums sent to the editor of the "Journal" for this young man, a clever student at one of our New England colleges and a tested Esperantist, will gladly be acknowledged. More information and the name of the proposed delegate we will send to any interested inquirer.

E. K. Harvey, Instructor at Perkins Institution for Blind, Boston.

DRO. EMILE JAVAL

La morto forrabis al ni novan oferon. Dro. Javal mortis en Parizo la 21a de januaro. Kiom perdis nia afero kun la morto de tiu ĉi homo, scias bone ĉiu vera esperantisto. Sendube la estonta historio de Esperanto enskribos lian nomon per oraj literoj. Dro. Javal estis fama pariza okulkuracisto. Sian namon la mortinto glorigis ne nur per siaj medicinaj laboroj, sed ankaŭ kiel scienculo kaj sociisto. Kiel kuracisto li eltrovis sian famon, kiel scienculo li estis elektita deputato en la franca parlamenton.

Tutan sian vivon la mortinto laboris tiel, kiel povas nur labori homo kreita por granda celo en la vivo. La kruela sorto antaŭ sep jaroj ekfrapis lin per granda malfeliĉo. Dro. Javal perdis tute sian vidon. Multaj el ni sendube post tiu ĉi ekfrapo de la sorto perdis sian energion kaj fariĝis tute sentaŭgaj por la vivo. Dro. Javal tamen apartenis al tiuj homoj, kiuj mortas morale nur tiam, kiam ili mortas entute. La malfeliĉa blindulo rapide paciĝis kun sia sorto kaj decidis daŭrigi sian ĉiutagan laboron. Li eĉ ne forlasis la akceptadon de malsanuloj, kompreneble kun la helpo de sia asistanto. Sed tuj li konvinkiĝis, ke la laboro en tiu ĉi direkto estos tute ne ebla, kaj li decidis tute ŝanĝi sian vivon, kvazaŭ naskiĝus blinda.

Al tiu tempo apartenas lia aliĝo al Esperantistaro. Estas tre interese, kiamaniere Dro. Javal fariĝis nia samideano.

Dro. Javal en siaj pli junaj jaroj, kiam li ne estis ankoraŭ blinda, interesiĝis multe, kiel homo progresema, pri la demando de lingvo internacia. Kaj nun li ekmemoris, ke li iam legis malgrandan broŝureton pri Esperanto. Li komisias al sia sekretario alporti denove tiun ĉi broŝureton. Sed kia estis lia ekmiro, kiam lia sekretario, reveninte el librejo, sciigis al li, ke Esperanto havas jam grandan bibliotekon. Dro. Javal mirigita venigis grandan nombron da

libroj pri kaj en Esperanto kaj komencis fervore kun la helpo de sia sekretario lerni nian lingvon. Post iom da tempo li fariĝis la plej fervora nia samideano.

Fariĝinte Esperantisto, Dro. Javal estis tamen tute alia, ol multaj el ni. Li komprenis bone, ke la platona amo al ia ideo ne sufiĉas, kaj li komencis agi en tute alia direkto. Multaj el vi sendube aŭdis pri eksistado en Parizo de "Centra Oficejo." Tiu ĉi institucio, kiu koncentrigas ĉiujn laborojn pri kaj en Esperanto postulis grandajn elspezojn por sukcesa plenumo de sia ĉefa celo. Dro. Javal oferis malavare por ĉi tio grandan sumon da 80,000 fr. kaj tion li faris tute kaŝe, ne volante ke oni parolu pri li. Se la mortinto farus nur ĉi tion por Esperanto, li havus rajton esti enskribita per oraj literoj en la historio de Esperanto, sed li faris ankoraŭ pli. Dank' al siaj konatuloj en la plej alta sfero Pariza li komencis jam sukcese la agadon por enkonduki Esperanton en francajn lernejojn. Multaj el francaj deputatoj promesis al li agi pri ĉi tio en la franca parlamento, kaj kiel ni scias, la afero iris rapide antaŭen. Dro. Javal ne sukcesis tamen ekvidi la rezultaton de siaj klopodoj; li mortis en la momento, kiam li estis por ni la plej necesa!

Unu el heradaĵoj, kiuj restis post la mortinto estas lia tre interesa libro "Inter blinduloj." La malfeliĉa senvidulo donas en ĝi tre interesajn konsilojn al ĉiuj blinduloj, kiel oni devas agi perdinte la vidon. Kiu volas konatiĝi kun la granda spirito de nia mortinta samideano, legu tiun ĉi interesan libron!

Dro. Javal, kiel rakontas liaj ĉirkaŭantoj, ĝis la lasta momento parolis kaj pensis pri Esperanto: li eĉ mortis kun Esperanto sur la lipoj!

Dormu tranvile kara samideano!

Inter veraj Esperantistoj neniam mortos Via granda nomo.

Lozo.

TO THE MEMBERS

A good way to find out how much you really know about Esperanto is to write a letter of two or three hundred words to another Esperantist, and to ask your correspondent, when he replies, to send you back your own letter corrected. Of course you are to do the same for him.

THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL wishes to help its members to get correspondents who

will help them. It will, therefore, print the name and address of any of its members in the Korespondada Fako for ten cents. State clearly whether you wish to correspond with foreigners only or with any one. We should not advise one to write to foreigners, unless one has read carefully at least fifty pages of the Krestomatio. State, therefore, whether or not you have read this work.

PRIPENSOJ KONCERNE LA MALFACILECON EN LA LERNADO DE ESPERANTO

Sendube kio ĉefe allogas la amanton kaj konanton de lingvaj studadoj al la ellernado de Esperanto, estas la facileco de la akiro de tiu ĉi internacia interkompreniĝilo. Li tuj vidas, ke la gramatikaj reguloj estas tre malmultnombraj kaj simplaj, ĉiam sekvas nur la leĝojn de la ĝenerala homa inteligenteco kaj neniam allasas ian escepton. Tial oni pensus ke studentoj de Esperanto traleginte zorge lernolibron kaj kelkajn literaturajn pecojn, kiam ili komencas uzi memstare la lingvon, malofte farus gravajn malĝustaĵojn. Sed eraras treege, kiu pensas tiel. Mia sperto instruis min, ke la Esperantaj skribaĵoj eĉ de sufiĉe kleraj personoj estas plenaj je malĝustaĵoj. Konsiderante tiun ĉi fakton oni pensus, ke nia kara lingvo ne posedas la multe gloratan facilecon de la ellernado. Tio ĉi ankaŭ estus eraro.

Ĉe la ellernado de lingvo du punktoj devas esti distingataj, la kapableco kompreni la lingvon uzatan de aliaj ĉu en skribado ĉu en parolado, kaj la kapableco uzi la lingvon memstare. Dum en naturaj lingvoj la akiro de ambaŭ kapablecoj estas egale malfacila, kaj plej malfacile estas kompreni parolanton, en Esperanto la kapableco kompreni aliajn povas esti perfekte proprigata sen la plej malgranda malfacilaĵo. Alia estas la afero, kiam la nespertulo komencas uzi memstare la lingvon. Se oni estas kontenta je kompreno sola, ne ekzistas ankaŭ tie ĉi ia malfacilaĵo. Ĉar oni preskaŭ ĉiam estas kapabla eltrovi la sencon de skribaĵo de nespertulo. Li skribu kaj parolu, kiel ajn ordon en la haoson de liaj vortoj aŭ trovi, kion li intencas diri. Eble estas pravaj, kiuj pensas tiamaniere, eble lingvo, precipe internacia lingvo, ne devas plenumi ian alian taskon ol tiun de interkompreniĝilo. Tiaokaze ĉiu povas skribi kaj paroli Esperanton ne sekvante iajn lingvajn leĝojn, se nur li ne skribas aŭ parolas tiel neleĝe aŭ tiel malbone, ke eĉ la senco de liaj vortoj ne povas esti eltrovata. Sajnas al mi, ke multaj Esperantistoj en nia lando estas kontentaj je tio ĉi, kaj mi ne povus pruvi logike, ke ilia pensmaniero estas malkorekta.

Sed estas homoj, kiuj malestimas lingvon malplenan je ordo kaj regulo, kaj amas lingvon nur puran, bone regulitan. Ili lingvaj sentoj estas tiel delikataj, ke ili sentas, por tiel diri, doloron aŭdante aŭ legante malĝustaĵojn

same kiel certaj bestoj ĉe certaj tonoj. Pro tiu ĉi kaŭzo ili malpermesas al siaj infanoj proprigi vulgaresprimojn kaj kutimigas ilin al pura, ĝusta lingvo. Konsiderante la pensmanieron de tiaj homoj, oni devas konfesi, ke Esperanto prezentas iom de malfacilaĵo videbla sole en la memstara uzado de la lingvo.

La ĉefa kaj plej ofta eraro estas la neĝusta uzado de la kazoj. Oni ne povas ripeti al la lernantoj sufiĉe ofte, kaj akcentegi al ili sufiĉe forte, ke deklinacieblaj vortoj, substantivo, adjektivo kaj pronomo, postulas aŭ la nominativon aŭ la akuzativon, *unu* el kiuj nur estas korekta en okazo donita. La reguloj en tiu ĉi rilato estas tre simplaj, kaj troviĝas malkonfuze klarigitaj en ĉiu plena lernolibro (vidu "Practical and Theoretical Esperanto" No. 49 and 60). La observado de tiu ĉi sola punkto farus la skribaĵojn de multaj komencantaj entusiasmuloj multe pli ĝueblaj al sperta Esperantisto, kaj igus lin ne ĵeti ilin naŭzite en la forĵetajkorbon.

Alia tre ofta malkorektaĵo estas la uzo de la adjektiva formo anstataŭ la adverba, kaj kontraŭe. La adjektiva finiĝo devas esti uzata nur kiam la adjektiva vorto estas atributo de substantivo aŭ pronomo, sed se ĝi rilatas la enhavon de infinitivo aŭ de tuta frazo, la adverba formo devas esti prenata. Tial estas malkorekte diri: "Danci estas amuza," oni devas diri, "amuze." Estas malkorekte diri: "Ke la forteco de Esperanto konsistas en ĝia simpleco, estas elmontrata per la sekva komparo," oni devas diri "elmontrate" (vidu finon de § 62 kaj ankaŭ 81).

Eraroj okazas ofte ĉe la uzo de reflektaj pronomoj, kvankam oni povas doni klarajn instruojn pri ili (vidu §§ 63, 66).

Estus tro longdaŭre montri ĉiujn malkorektaĵojn ordinaraj faratajn. Sufiĉu la cititaj. Ili estas la plej oftaj, kaj ilia troa ĉeesto en skribaĵo pereigas al bona Esperantisto posedanta la suprediritan delikatan lingvan senton la plezuron vidi sian karan lingvon en uzado.

La punktoj ĝis nun priparolitaj apenaŭ prezentas realan malfacilaĵon. Ĉar la lernolibroj povas doni, kaj kelkaj efektive donas precizajn, simplajn regulojn, kiujn oni nur devas sekvi. Sed mi deziras tiri la atenton de la legantoj al vera malfacilaĵo, nome al tiu eviti idiotismojn. Fiksaj reguloj tie ĉi ne ekzistas, nek povas esti donataj; nur korekta lingva instinkto povas

gvidi la studenton sur la ĝusta vojo. Kiu komprenas krom sia patra lingvo ian alian, pli malofte eraros.

Jen estas kelkaj ekzemploj de idiotismoj: "Tiu ĉi infano estas ambaŭ bonkora kaj inteligenta." Tio estas idiotismo angla. Nenia alia naciato esprimus tiun ĉi ideon en tia maniero, sed li dirus, "Tiu ĉi infano estas (kaj) bonkora kaj inteligenta," aŭ "tiel bonkora kiel inteligenta." Alia ekzemplo: "Tiu plano mankas sistemon." La pli bona esprimo estus: "Al tiu plano mankas sistemo."

Resumante mi dirus: nia kara lingvo ne estas nur lingva interkompreniĝilo, kiun ĉiu povas uzi arbitre sen leĝo aŭ regulo; sed ĝi estas vera lingvo, kies purecon la bonaj kaj seriozaj Espe-

rantistoj devas gardi tre zorge. Ĝi ne prezentas iajn malfacilaĵojn lerni kompreni aliajn; sed iom de malfacilaĵoj en la memstara uzado. Parte tiuj ĉi ne estas realaj, ĉar ekzistas facile kompreneblaj reguloj, kiujn oni nur devas sekvi. Reala malfacilaĵo estas la evito de idiotismoj. Estas unu rimedo subigi tiun ĉi, nome, *multa legado de la verkoj de niaj klasikuloj*. Precipe la publikaj skribistoj zorgu treege, ke en siaj skribaĵoj ili ne dekliniĝu de la bona stilo kreita de niaj klasikuloj. Alimaniere la fanfaronanta mezvaloreco kaj duonklereco, kiu precipe ĉe ni ludas grandan rolon, malbelformigos la belegan kreitaĵon de nia majstro. Ni imitu kaj sekvu lian esprimmanieron kaj tiel gardu nian karan lingvon en la logikeco, pureco kaj beleco, en kiuj ĝi estas donita al ni.

Dro. Max Talmey (N. Y.), Prezidanto de la "New York" Esperantista Societo.

62 West 126th Street, New York City.

ESPERANTO IN THE AMERICAN PRESS

An interesting editorial on Esperanto in the "Medical Record" of March 16th shows clearly that the medical profession is fully alive to the need of an international language. This editorial, though not entirely pro-Esperanto, is very impartial and is well worth reading as presenting the subject from the viewpoint of one who has "from time to time urged the adoption of Modern Greek" as an international medium, but who now "frankly de- spairs of its acceptance." A glance at the roll of the A. E. A. will show how very many doctors are now studying Esperanto. A prominent doctor, professor in a large medical college, recently told the writer that what turned him to Esperanto was the keen disappointment he felt upon receiving the report of a recent international congress of medical men to which he had submitted a paper. All the discussions, papers, etc., were in Spanish; his own paper alone was in English.

Perhaps the most important publication last month on the subject which interests us was the advice sent by the U. S. government to American merchants to study the language. It is contained in the daily consular reports issued by the Department of Commerce and

Labor, dated March 2nd, and is the result of a letter from the American consul at Breslau. We quote one sentence: "Our manufacturers may wake up some day to see English, French and German salesmen running over the world, glibly talking Esperanto wherever they go, and taking large orders. This is no exaggeration, for Esperanto is being taught in many Japanese cities, and even Peru publishes an Esperanto journal."

In connection with the above we note with pleasure the contents of the international commerce journal, "Eksport-Jurnalo," issued in Frankfort, Germany, a veritable mine of information to merchants.

The "Scrap-book," a literary monthly magazine issued by the Munsey Pub. Co., of New York, begins this month a series of lessons and discussions on Esperanto, edited by our friend, Dr. D. O. S. Lowell, of the Boston Society. The lessons, modeled after an original plan and written in the doctor's well-known, witty, personal style, will be widely appreciated. We have received copies of the "El Esforzador Mexicana" for February, in which we note that the editor has begun a series of ten lessons on Esperanto.

LA LANGTONDITA PASERO

JAPANA FABELO.

Antaŭ nekalkuleblaj jaroj vivis maljunulo kaj maljunulino. La maljunulo, kiu havis bonegan koron, tenis junan paseron, kiun li elnurtis tre ameme. Sed lia edzino estis malafabla kaj kruela maljunulino, kaj unu tagon, kiam la pasero estis manĝinta malmulte da pasto, kun kiu ŝi estis amelonta sian tolaĵon, ŝi estis tiel furioziĝata ke ŝi tondis la langon de la pasero kaj elpelis la birdon. Kiam la maljunulo revenis de la montetoj, kaj trovis ke la birdo estis defluinta, li demandis kie ĝi estis; tiam la maljunulino respondis ke ŝi estis tondinta ĝian langon kaj ĝin elpelinta, ĉar ĝi estis ŝtelinta ŝian amelpaston. *Aŭdinte* tiun ĉi kruelan rakonton, la maljunulo malĝojis treege kaj pensis en lia koro "Ho ve! kien mia birdo estas irinta? Kompatinda birdo! Kompatinda malgranda langtondita pasero! Kie estas via nuna hejmo?" Kaj li vagis de unu loko al alia loko serĉante sian dorlotaton kaj kriante, "Kie estas la langtondita pasero?" "Kie estas la langtondita pasero?" "Kie vi vivas?"

Unu tagon, je la piedo de ia monto, la maljunulo renkontis la perditan birdon; kaj kiam ili estis gratulintaj unu alian je ilia reciprokan sendanĝerecon, la pasero kondukis la maljunulon al ĝia hejmo, kaj, prezentinte lin al ĝia edzino kaj paseridoj, metis antaŭ li ĉiujn specojn de frandaĵoj, kaj regalis lin tre gastame. Fine, la maljunulo diris ke li devis iri hejmen; kaj la birdo, prezentante al li du salikajn korbajn, petis lin ke li ilin portu kun li kiel disigdonaco. Unu el la korbaj estis peza kaj la alia estis malpeza; tial la maljunulo, dirante, ke ĉar li estis maljuna kaj malforta li volis nur akcepti la malpezan korbon, metis ĝin sur sia ŝultro, kaj foriris al sia hejmo, lasante la paserfamilion ĉagrenega *pro lia foriro*.

Kiam la maljunulo alvenis hejmen, la virino tre koleris kaj komencis riproĉigi lin, dirante, "Nu, kie vi estis estinta tiujn ĉi multajn tagojn? Beleta afero ja vagi je via *aĝo!*" Ho!" li respondis, "Mi estas vizitinta la paseron; kaj kiam mi foriris, *ĝi* donis al mi tiun ĉi salikan korbon kiel disigdonaco." Tiam la geedzoj malfermis la korbon por vidi tion kio estis interne, kaj jen estis la korbo plena de oro kaj arĝento kaj multekostaj artikoloj. Kiam la maljunulino, kiu estis tiel avida kiel ŝi estis malafabla, vidis la tutan riĉecon etenditan antaŭ ŝi, ŝi ŝanĝis sian riproĉegantan modon, kaj ne povis kontroli sian ĝojon. "Mi ankaŭ iros kaj vizitos la paseron," ŝi diris, "kaj ricevos beletan donacon."

Tiam ŝi demandis la edzon pri la vojo al la domo de la pasero, kaj ekiris je sia vojaĝo. Obeante lian ordonon, ŝi fine renkontis la langtonditan paseron, kaj ekkriis:—"Bonrenkontita! bonrenkontita! Sinjoro Pasero! Mi estas atendinta havi la plezuron vidi vin." Tiamaniere ŝi penis flati kaj delogi la paseron per dolĉaj paroladoj. La birdo estis devigata inviti la maljunilon al ĝia hejmo; sed ĝi ne regalis ŝin kaj diris nenion pri disigdonaco. Ŝi, tamen, demandis pro io por kunpreni kun si kiel memoraĵo de sia vizito. Tial la pasero prezentis du korbojn, kiel antaŭe, kaj la avida maljunulino, elektante la pli pezan el ili, forportis ĝin kun ŝi. Sed kiam ŝi malfermis la korbon por vidi tion kio estis interne, ĉiaj specoj de koboldoj kaj feinoj saltis de ĝi kaj komencis turmenti ŝin.

Sed la maljunulo filigis filon, kaj lia familio fariĝis riĉa kaj prospera. Kia feliĉa maljunulo.

Tradukis E. Asada, Aoyama, Tokyo, Japan.

This fable has been corrected in only four places; these corrections are printed in italics. The first correction was "*aŭdinte*" instead of "*aŭrinte*"; the second, "*ĝi*" instead of "*ili*" (which also could have been used). "*Tempo de vivo*," an idiom, has been replaced by "*aĝo*," and "*ĉagrena disigdonaco de li*" by "*pro lia foriro*," as being a little clearer. Otherwise the fable is just as the editor received it. Will our readers please examine it carefully? They may find a

few slight errors in it; it will be a good exercise for them to try to find them, and to make the necessary corrections. Perhaps we shall have something to say about them in another number.

We should also advise those of our readers who have mastered Bullen's Lessons, and who have read a few pages of good Esperanto prose, to turn Lincoln's speech at Gettysburg into Esperanto.

KRONIKO

The time for the Third Esperantist Congress is rapidly approaching. We want the delegation from America to be as large as possible. If the societies which intend to send a representative will notify us as soon as possible we will make the various members, to some extent, acquainted with each other before they meet in Cambridge. We would be glad also to hear from any individual Esperantists who are planning to be in England during August.

In far off **Manhattan, Kansas**, there is an up-to-date Esperanto group under the direction of Herbert F. Roberts, Professor of Botany in the State College of Agriculture. On the evening of March 18th they gave, in Institute Hall, a very interesting Esperanto evening, musical and literary, including an address on "The Problem of International Speech," by Mrs. Roberts. This essay has, we hear, been accepted by the "Popular Science Monthly." Esperanto words to Mendelssohn's Spring Song and Schubert's "Röslein auf der Heide" were written by Prof. Roberts and sung by a ladies' quartet.

In **Boston, Mass.**, another Esperanto concert was given by the Esperantaj Pioneroj in the Perkins Institution. The program included various vocal and instrumental numbers, "Hamlet," Act III, Scene 1 (by seven boys), a chapter from "Pickwick Papers" acted, an exercise in geography with map work, and an address by Prof. Huntington, of Harvard. This gentleman spoke entertainingly of his experiences at the Geneva Congress, and then presented diplomas to the three fortunate club members. Mr. Twombly, Sec. of the A. E. A., spoke in Esperanto and in English. *By these concerts the "Pioneroj," all young blind students at the Institution, are endeavoring to raise a sum sufficient to send a delegate to the Third Esperanto Congress in England.*

The **Ohio University Club** is doing excellent work and is well organized now, with Shirley T. Wing—the man who won the Rhodes Scholarship this year—as president, and C. W. Park as secretary. Prof. G. B. Viles acts as "critic." At a late meeting of the North End Group of the Columbus Society, easy papers on simple topics were read by the members. One young girl, who wrote on "The Apple," cleverly worked in the account of Adam and Eve and caused much amusement by manipulating a specimen while she talked.

Interest in Esperanto has long been aroused in the Federal capital. Many government officials, scientists, and journalists have been studying it privately. Now we are glad to hear of the formation last month of a small club, meeting weekly at Tacoma Park, a suburb of **Washington, D. C.** The secretary is Mr. Robert L. Lerch, of the Hydrographic Office (Navy), Washington.

A fourth course for beginners in Esperanto has been started by the Field and Forest Club, of Boston, Mass., in co-operation with the local Society. It meets every Thursday, at 8 P. M., at 3 Joy street, and is free to all. As a result of the discussion in the "Boston Transcript" by Prof. Wiener, of Harvard, and the Ĉef-redaktoro of the "Journal," a public debate on the merits of the language has been arranged for, to be held in the lecture room of the Boston Public Library. Open to the public. A new group has been started in Boston, under the tutelage of Sro. Bresler, who first learned the language in London, England. The group consists wholly of foreigners, Russians, Germans, etc., and meets weekly at 88 Charles street.

The **University of Chicago Esperanto Club** is doing active propaganda work. It has now 38 members, of seven nationalities, and has chosen the motto "Ameriko por Esperanto!" Its president, Mr. Floyd B. Hardin, of Middle Divinity Hall, has been instrumental in forming several small classes in various parts of Illinois.

By lectures, classes and articles in local papers the Esperanto movement is kept well before the **Philadelphia** public. An important lecture by Mr. J. Charles Walker to the teachers of the Commercial High School aroused much interest, and a class will probably result.

The **Toledo, Ohio**, Esperanto Club meets for instruction every two weeks at 131 Michigan street. They are striving to arouse public interest in the language. Will persons desiring to join please communicate with Mr. H. S. Blaine, Box 999, Toledo.

In recent issues we printed incorrectly the names of some Esperantists who wish to form classes in their various localities. They should be:—

Mr. W. M. Ampt, cor. 3rd and Walnut streets, Cincinnati, Ohio.

Mr. W. S. Hamburger, 1924 Mosher street, Baltimore, Md.

Kentucky Esperantists, Attention! All Esperantists who intend to be present at the K. E. A. at Winchester next June are requested to notify me, in order that we may arrange for a meeting of our "samideanoj," and possibly form a Kentucky group.

Wren J. Grimstead, Box 172, Richmond, Ky.

The first annual banquet of the **Toronto Esperanto Club** was held March 21st, at St. Charles Hotel. About fifty enthusiastic Esperantists attended, and, despite the fact that the majority of the members have been studying

the language only since November, the speeches, which were all made in the international language, were followed with much interest by all present. The retiring president, Sro. Gordon Thompson, spoke enthusiastically of the prospects for the future and announced the intention of the Club to publish a monthly Esperanto journal next fall in Toronto. Mr. Thompson was presented by Miss Fielding, on behalf of the Club, with a very handsome pearl star, the official emblem of the language.— ("Toronto News.")

AL NIAJ FREMDAJ AMIKOJ

La kolegioj en nia lando energie antaŭenpuŝas la Esperantan agadon,—aparte en la Okcidentaj Ŝtatoj. Sindonemaj estas tiuj grupoj en Ohio Universitato (sub la direktado de Prof. G. B. Viles) kaj en la Universitato de Ĉikago, kaj en Amherst kaj Kansas State Kolegioj de Ter-kulturo. Junaj blinduloj, studentoj en Perkins Institution, Boston, donis Esperantan koncerton al granda aŭdantaro. Ili intencas sendi delegiton al la Tria Kongreso. Nova klubo, ĵusfondita en Washington, nia

nacia ĉef-urbo, konsistas el regno-oficistoj, scienculoj, verkistoj, k. t. p. La registaro, en oficiala dokumento eldonata de la Komerca Fako avisas ke ĉiu komercisto ellernu la Esperantan lingvon por utiligi ĝin en fremdaj interŝanĝoj. La nacia gazetaro daŭrigas la esperantan diskuton; grava medicina revuo enhavis seriozan artikolon pri la lingvo kaj ĝia estonta utileco al kuracistoj. Okazos baldaŭ en granda Ĉambrego de la Bostona Publika Biblioteko voĉa disputado pri Esperanto.

ESPERANTO ABROAD

Abroad Esperanto is making rapid strides. At the German Congress in Dresden the German Esperanto Society has planned an Esperanto section. New courses are being conducted for *merchants* in Bremen, Breslau and Dusseldorf. Three courses are now given in the public schools of Karlsruhe. Prof. W. Ostwald has delivered another lecture in Leipzig before a large audience of professors, students, teachers and merchants. The Dean of the Philosophical Faculty and the Vice-President of the Board of Trade presided. From the "Pola Esperantisto" we learn of many new courses being formed there. It has also an excellent article on the death of Dr. Emil Javal, of Paris. He was a world-renowned oculist who himself became blind in recent years. He devoted the latter years of his life to work for the blind, and was much interested in Esperanto. Before he died he presented the

Centra Oficejo with 80,000 francs to carry on the work, and labored hard to have the language taught in the French schools. The Japana Esperantisto (illustrated) tells of the founding of two konsulejoj in Tokio and prints the photographs of the consuls. The graduating exercises at the Lernejo de la Lingvo Esperanto were very interesting. Many famous Japanese were present. Members of the Cabinet spoke, and Mr. Hajashi, Minister of Foreign Affairs, wrote a very favorable letter to the magazine. We note that 705 members were registered in the National Association up to February. The government of Peru has passed a law appropriating 125 francs a month to the Esperanto and scientific journals published in Lima, so long as they shall be issued, on condition that they send to the government officials 50 copies for distribution among the various scientific bodies in Peru.

GRAMMATICAL EXPLANATIONS

The Participle. The true participle is used very often in Esperanto; indeed the frequent use of it is almost a mark of good Esperanto style. However, one must be sure to recognize a true participle. Remember that many of the words ending in "ing" are not participles, but infinitives or gerunds in "ing," in other words, are verbal nouns. *Whenever these "ing" words are subjects or objects of a sentence, or whenever they follow prepositions, they are to all intents and purposes "nouns"* (see Grammatical Explanations, February number of Journal). They are not therefore true participles, and must not be confounded with them. They are mentioned here merely to put the reader on his guard against confusing them with the true participle.

The true participle has two forms: one *adverbial*, ending in "e"; the other *adjectival*, ending in "a."

The first takes the place of an *adverbial clause*, generally of time. For example: "Parolante al li, mi aŭdis voĉon" is equal to "Dum mi parolis al li, mi aŭdis voĉon." "Enirinte la domon, mi demetis mian ĉapelon" is a shorter form of "Post kiam mi eniris la domon, mi demetis mian ĉapelon."

(Note that this adverbial form is always connected with the subject of the main sentence.)

The *adjective* form of the participle may qualify either the subject or some other noun or pronoun in the sentence. It takes the place of a *relative clause*. For example: "La viro hieraŭ alveninta parolis al mi tiun ĉi matenon" is equal to "La viro, *kiu* hieraŭ alvenis, parolis al mi tiun ĉi matenon." "Mi vidas la virojn transirantajn la straton" equals "Mi vidas la virojn *kiuj* transiras la straton."

The *passive* participles are used in the same way, the same distinctions of adverbial and adjective forms being maintained. For instance: "Ordonite iri tuj, mi iris"—"having been ordered to go immediately, I went,"—"after I had been ordered, etc." "Mi estas la viro ordonita iri tuj"—"I am the man *who* has been ordered to go immediately."

The proper use of the participle enables one to get rid of some clumsy phrases. Look at the following: "Ĉiuj tiuj kiuj venis hieraŭ"—"all those who came yesterday." Use the participle and we have "Ĉiuj hieraŭ venintaj" or "ĉiuj hieraŭ venintoj."

All the good text-books treat this matter to some extent: see Bullen Ex. 14, Cox's Grammar, Fruictier, etc. Above all, read carefully the Krestomatio, being on your guard to note the exact meaning of every participle.

Adjective or Adverb. Generally speaking, Esperanto uses the adjective and the adverbial forms in the same manner as in English. We have already noted one exception when speaking of the participle; however, this is not a real exception, because English has no distinct forms for the participial adverb and adjective; both of them in English end in the simple "ing."

There is, however, a real difference between the English and the Esperanto usage in certain cases. The rule may be stated as follows: "When there is no noun or pronoun with which the adjective can agree, use the adverbial form." The classical example is found in Ex. 5 of Bullen's Lessons: "Resti kun leono estas danĝere." Other examples: Bone estas elparoli zorgeme,"—"Estas permesate kolekti florojn en tiu ĉi ĝardeno."

(Note that the indefinite "it" is not expressed in Esperanto: it rains = "pluvas"; it is good = "estas bone," etc.)

Tenses. In English we do not always use the tenses in a logical way. We often, for instance, use the present for the future. This is not allowed in Esperanto. Therefore, "If I see him to-morrow, I will tell him," is to be translated, "Se mi *vidos* lin morgaŭ, mi diros al li." "When you *have finished* your speech, please sit down" really means "when you shall have finished, etc." In Esperanto, we must write it thus: "Kiam vi *estos fininta* vian paroladon, bonvolu sidiĝi," or, if one prefers, "Post kiam vi *finos* vian paroladon, k. t. p."

Again, in English we often use a construction with "should" or "would" for the future. Such a construction may be considered a "secondary" future; it is not, however, allowed in Esperanto. For instance, we write in English, "I thought yesterday that I *should* go away." Now, what did I really think yesterday? Was it not, "I shall go away?" If so, why not write it so? This is what Esperanto does, following the logical method, also followed by several other languages. Therefore, the sentence mentioned above is to be translated thus: "Mi opiniis hieraŭ, ke mi *foriros*."

In other words, in Esperanto *pay strict attention to the real time*. And the same rule applies to the use of the proper participle. In Esperanto we have six participles, three active and three passive, and *each one of these is to be used according to its logical meaning*. For instance: "Amanta" = loving (present); "aminta" = having loved (past); "amata" = being loved (present passive); "Amita" = having been loved (past passive).

Now you will notice that in English we use the form "loved" for an active participle and for two passive participles. Some persons are, therefore, inclined to ask what is the Esperanto word for this English so-called "past" participle, which is really a past *passive* participle. Now there is *no one* Esperanto word for this, but *three* words, answering to *three different ideas*. For instance "loved" as such has no Esperanto translation, unless you mean something more definite. If you mean "being loved now," it is "amata"; if you mean "having been loved," it is amita; and, if you mean "having loved" (active voice), it is, of course, the active participle, "aminta." When, therefore, you purpose to translate the "slippery" English participle in "ed" into Esperanto, be sure that you *add to this participle a more definite meaning* than it has when it stands alone by itself. Otherwise, you will get into trouble.

A correspondent has asked us to point out the difference between the following pairs of words: "Bandaĝo" = bandage. "Kompreso" = a compress (medical term)—A "bandaĝo" might hold down tightly a "kompreso."

"Bloko" = a block for a rope, a pulley-block; "ŝtupo" = a block of wood, possibly even a log.

"Froti" = to rub; "grati" = to scrape.

"Biskvito" = a biscuit, a "cracker"; "kringo" = a "cracker" with a hole in it, a "cookie"; "kraken" = a hard brittle biscuit, a "cookie."

"Kanvaso" = canvas, the material; "tapeto" = anything to cover walls with, wall-hangings, "Planko" = "floor"; "pargeto" = fancy wood flooring.

"Polvo" = dust, what we find in the streets, "dirt"; "pulvoro" = powdered substance, "pulvorigi" = to pulverize.

"Tribuno" = pulpit, reading-desk; "estrado" = stage, platform.

"Vana" = useless, futile; "vanta" = frivolous.

"Fabriko" = a factory; "fabrikado" = the manufacturing, the making of. "Manufakturo" seems to mean the same thing; it seems to be unnecessary.

We have also been asked to define more clearly than the dictionary does the following words:—

"Brutaro" = cattle, live-stock; "bruto" = one such animal.

"Cirkelo" = a compass, an instrument to draw with.

"Disponi" = dispose of, hand over, not to arrange.

"Ekspertizi" = to survey from a skilled point of view.

"Ekstrakto" = extract, medicinal extract.

"Inĝenier" = engineer, civil or military, not an engine-driver or locomotive "engineer."

"Kamero" = closet, a little room without windows.

"Kontoro" = "counting-room," business office.

"Krano" = tap, faucet.

"Laĉo" = lace, flat cord, "shoe-lace," etc.

"Trombo" = water-spout, not a faucet.

"Klefo" = this seems to be the proper name for "key" in the expression "key of F."

Indefinite Article. Generally speaking, there is no indefinite article in Esperanto. If, however, one wishes to insist strongly upon the one person or thing, you may use "unu." This use of "unu" is almost confined to fables, etc. Do not use it often. Krestomatio, page 61, begins, "Unu advokato, tre malgranda," to be sure, but immediately follows it with "venis juĝejon," not "unu juĝejon." When used, "unu" generally can be translated "a certain," "one alone," etc. Ninety-nine cases out of a hundred, the English indefinite article is not translated.

Ĉia, Tia, Kia, and Ĉiu, Tiu, Kiu. The note at the end of Exercise 21, Bullen's Lessons, explains the difference between these two sets of words. The "ia" set has to do with *quality*, the "iu" with individuality. "Ĉia homo" = every *sort* of man; "ĉiu homo" = every man. "Tia homo" = that *sort* of man, *such* a man; "tiu homo" = that man. Both the "ia" form and the "iu" form are *adjectives*, as the expressions just quoted show plainly. "Ĉiu" and "tiu," however, are often found standing alone, the noun being understood. "Ĉiu," therefore, often means every one, and "tiu" that person.

"Dum ĉe pli proksima observado de ĉiu objekto fariĝis al mi klare" (Krestomatio, p. 112) = While on closer observation of *every* object it became clear to me.

"Tiel al mi en ĉia okazo restas ankoraŭ 200 dolaroj jare" = "Thus there remains for us in any case (in every *sort* of case) still two hundred dollars yearly.

SKRIBU INTERNACIE

Esperanto is a language and, like every other language, has its own style and syntax. *It could not properly fulfill the purpose for which it was created, if it did not have these.* Why have clearness and regularity in pronunciation, orthography, and the fundamental grammatical rules, and yet throw this clearness and regularity away when we come to the practical use of the language?

Many Esperantists seem to be absolutely ignorant of these facts. They praise the regularity and clearness of Esperanto; but when they begin to write a sentence, they forget all about these, and blindly follow the rules of English syntax, and even use English idioms. *Now this is just where English is most difficult for the foreigner.* The so-called English grammar is simple enough; it is English syntax, English idiom, and English style, which "plays the mischief" with the intelligent "stranger." Therefore, we must not introduce these into our Esperanto conversation and writing.

How are we to avoid our Anglicisms? First, think clearly. Secondly, translate thoughts, not English words. Thirdly, remember that in an Esperanto sentence *every word is in direct relation to all the other words in the sentence: there are no loose nominatives or participles.*

The one nominative is the subject, the one accusative is the object, other nouns are governed by prepositions, adjectives agree with their nouns, etc. Fourthly, watch carefully the following words:—

(1) Should, would. 3 or 4 different meanings.

(2) That. 3 different meanings.

(3) Words ending in "ing." These may be nouns (infinitives), participles (adjectives), or gerundives (adverbs).

Study carefully the "grammatical explanations" in the February, March, April and May numbers.

Above all, *master Bullen's Lessons*; know at least half of the *exercises* by heart. Read the hundred first pages of the *Krestomatio* two or three times. Learn by heart *phrases and sentences* selected from it.

To test your knowledge, translate a part of Dr. Talmey's article into English. Then translate this back into Esperanto; translate by *phrases, not word by word.*

Think over the English idiom: "Five days ago,"—"In two days I shall see you,"—"He saw he was coming,"—"all right,"—"The car in front is behind time."

MAGAZINES

La Revuo. Hachette et Cie., Paris. The March number of the *Revuo* is an important number for Esperantists. There is a two-page article on Dr. Javal by Dr. Zamenhof himself; and also a short poem in memory of Dr. Javal by Professor Carlo Bourlet, president of the Paris Esperanto Group. Then follows a translation of the book *Ecclesiastes* from the Bible; this is also the work of Dr. Zamenhof. The number also contains the concluding portion of Professor Lambert's article on Sakuntala and the Hindu Theatre.

Pola Esperantisto. The Polish Esperantist, published in Lwów, Galicia, Austria, is certainly a good magazine for all Esperantists to read. It is printed altogether in Esperanto. Its literary editor is Dr. Bein, author of *Pola Antologio*, one of the best Esperanto writers in the world. The price of a year's subscription is the ridiculously low one of fifty cents (65 cents, if you send U. S. postage stamps).

The February number begins with a translation of Sienkiewicz's open letter to the German Emperor in regard to the Polish-German school

question. This is putting Esperanto to good purpose, using it as a means of bringing a humanitarian question before the world.

Then follows the article on Dr. Javal, which we have reprinted. Then there is an article founded on the Notes of a Military Physician in the Far East, Poems, Esperanto and Idiom Neutral, and the *Kroniko*.

Every Esperantist should support his own national propaganda journal. But it is not enough to do this alone. Even from the standpoint of one's own improvement, it is almost necessary to read books written by foreign authors, or at least journals edited in distant lands. By doing so, you learn to get rid of English idioms in your Esperanto, more especially if you read a magazine edited by Poles or Russians or Japanese. We heartily recommend the reading of the Polish Esperantist for this purpose, more especially as it is edited by such a competent Esperantist as Dr. Bein. Send your subscription directly to Societo Esperanto en Leopolo (Lwów), Galicia, Austria.

LA VIRO SENPATRUJA

(“THE MAN WITHOUT A COUNTRY.” BY DR. EDWARD EVERETT HALE.)

TRADUKITA KUN PERMESO DE LA AŬTORO PER E. L. ROBINSON, ALBUQUERQUE, N. M.

(daŭranta.)

Nolan pensis, ke la okazo ŝajnas al li kiel sendaĵo de Dio. Li komencis paroli pri Eŭropo, Vesuvio kaj la Francoj, kaj tiam, kiam ili havis ripoztempon, li demandis brave,—tamen ŝi diris, rakontante la historieton al mi kelke da jaroj poste, ke li paletigis, “Kian novaĵon vi ricevas de hejmo, Sinjorino Graff?” Sed tiu belega estaĵino trarigardis lin! Jupitero! kiel ŝi trarigardis lin! “Hejmo! Sinjoro Nolan! Mi pensis ja, ke vi estas la viro deziranta neniam denove aŭdi pri hejmo!” kaj ŝi foriris laŭlonge de la ferdeko al sia edzo, lasante kompatindan Nolan sola. Li ne ree dancis.

Mi ne povas rakonti lian historion regule; neniŭ povas tion fari nun; kaj, efektive, mi ne penas tion fari. Ĉi tiuj estas la tradicioj, kiujn mi elektis, laŭ mia kredo pri ili, el la historietoj rakontitaj pri ĉi tiu viro dum kvardek jaroj. La mensogoj rakontitaj pri li estas sennombraj. La junuloj kutimis diri, ke li estas la “Fermaskulo”; kaj George Pons mortis, kredinte, ke tiu estas la verkinto de “Junius” tiel punadata pro sia fama mensogo pri T. Jefferson. Pons ne estis tre klera pri historio.

Pli feliĉa rakonto ol la unu aŭ la alia el tiuj ĉi, kiujn mi jam priskribis, estas tiu pri la milito. Tio okazis baldaŭ poste. Mi aŭdis tiun ĉi historieton tri aŭ kvarforme, kaj ĝi eble okazis pli ol unufoje. Sed sur kiu ŝipo ĝi okazis, mi ne povas diri. Nu, en unu el la grandaj ŝipdueloj kontraŭ la Angloj, en kiu la ŝiparo estis vere baptata, okazis, ke kuglego de la kontraŭuloj eniris en unu el la fenestroj por paflegoj, kaj tuj mortigis la oficon de la paflego kaj la plimulton da la pafistoj. Nu, vi povas diri ĉion, kion vi deziras pri kuraĝo, sed tio ne estas bela vidaĵo. Kiam la nemortigitoj sin levis, kaj kiam la pafistoj kaj la helpantoj de la hirurgiisto forportis la mortigitojn, aperis Nolan sen sia supravesto kun la sargilo en la mano, kaj, kvazaŭ li estus komandanta oficio, kalkulis kaj metis en ordon la pafistojn; ordonante tion,—kiuj devas foriri kun la vunditoj, kiuj devas resti kun li,—tute gaje, kaj kun tia maniero, kia igis la virojn certaj ke ĉie estas bona kaj finos bone. Li finis

ŝargi la paflegon per siaj propraj manoj, kaj ordonis al la pafistoj pafi. Kaj tie li restis, kapitano de tiu paflego, gajigante la pafistojn ĝis kiam la paflego malvarmiĝis (kvankam tiel li estis antaŭmetita antaŭ la pafado de la kontraŭuloj)—montrante al ili pli facilajn manierojn por porti la pezajn kuglegojn—ridigante la mallertajn pafistojn pri iliaj propraj eraroj, kaj kiam la paflego malvarmiĝis, ŝargante kaj pafante ĝin du foje pli rapide ol iu alia paflego sur la ŝipo pafigis. La kapitano alvenis al ili por kuraĝigi la pafistojn, kaj Nolan ĉapeltuŝis kaj diris,

“Mi almontris al ili kiamaniere ni faras ĉi tion en la artilerio, sinjoro.”

Kaj ĵus ĉi tie en la historio ĉiuj legendoj konsentas inter si. La komandanto diris:

“Mi vidas tion, kion vi faris, kaj mi dankas vin, sinjoro. Mi neniam forgesos ĉi tiun tagon. Sinjoro, kaj vi ankaŭ neniam ĝin forgesos, sinjoro.”

Kaj kiam la tuta afero finiĝis, kaj li havis la glavon de la angla estro, inter ĉiuj ceremonioj sur la ferdeko li diris, “Kie estas Sinjoro Nolan. Petu Sinjoron Nolan'on, ke li ĉi tien venu.” Kaj kiam Nolan al li alvenis, li diris, “Sinjoro Nolan, ni ĉiuj dankegas al vi hodiaŭ; vi estas ja unu el ni hodiaŭ, kaj estos priparolata en la depeŝoj.” Kaj poste, la maljunulo demetis la ceremonian glavon, kiun li portis, donis ĝin al Nolan, kaj igis lin surmeti ĝin. La viro, kiu rakontis ĉi tion, ĝin vidis. Nolan infane ploris; kaj prave, tial ke li ne portis glavon de tiu infera tago ĉe la Adams Fortikajeto. Sed ĉiam poste, je ceremoniaj okazoj, li portadis la strangan glavon francan de la komandanto. La kapitano, vere, priparolis lin en la depeŝoj, kaj oni diris, ke li petis, ke Nolan estu pardonata. Li skribis specialan leteron al la Sekretario pri Milito, sed ĝi neniam fruktiĝis. Kiel mi diris, ĉirkaŭ tiu tempo oni ekneobservis la aferon en Washington, kaj tial la mallibereco de Nolan daŭris, ĉar estis neniŭ, kiu povis haltigi ĝin sen novaj ordonoj.

Mi aŭdis, ke li estis kun Porter, kiam tiu ĉi

kaptis la Nukahiwaajn Insulojn. Mi ne parolis pri la nuna Porter, sed pri la maljuna Porter, lia patro. Nolan estis, antaŭe, oficiro artileria, kaj batalis en la Okcidento; tial li sciis plu ol iu el la oficiroj pri fortikaĵoj, k.t.p., kaj li bonvole laboris por starigi tiun paflegaron. Mi ĉiam konsideris, ke estas bedaŭrinde, ke Porter ne lasis lin tie kiel komandanto kune kun Gamble. Tiu estus respondita al ĉiu postulo pri lia puno. Ni estus tenintaj la insulojn, kaj nuntempe havantaj almenaŭ unu stacion en la Pacifika Oceano; kaj niaj francaj amikoj, kiam ili deziris tiun ĉi malgrandan akvoprenejon, estus trovinta ĝin antaŭe okupita. Sed Madison kaj la Virginianoj ĉion tion forĵetis.

Ĉio tio okazis antaŭ preskaŭ kvindek jaroj. Se Nolan estis tiam tridekjara, li kredinde estis ĉirkaŭ okdekjara, kiam li mortis. Tamen li ŝajnis esti sesdekjara, kiam fakte li estis nur kvardeka. Sed ŝajnis al mi, ke li neniam poste ŝanĝis, eĉ pri harero. Kiel mi figuris lian vivon laŭ tio, kion mi aŭdis kaj vidis pri ĝi, li vizitis certege ĉiun maron, sed li preskaŭ neniam elŝipiĝis. Li certege, konis pli da niaj oficiroj, ceremonie, ol ia ajn vivanta viro konas. Li diris al mi, unufoje, ke neniu en la mondo vivadas tiel laŭregule kiel li. "Vi scias, ke la junuloj nomas min 'La Fermaskulo,' kaj vi scias, kiel multe okupata li estis." Li diris, ke legi la tutan tempon ne estas pli bone ol fari ion alian la tutan tempon. "Mi aranĝas miajn notlibrojn, skribante en ili je regulaĵoj horoj notojn el ĉio, kion mi legas, kaj mi en tiujn ĉi enmetas miajn elĉerpaĵojn." Ĉi tiuj libroj estis tre kuriozaj. Li havis ses aŭ ok, laŭ diversaj temoj. Estis unu pri Historio, unu pri Natura Scienco, kaj alia, kiun li nomis Diversaĵojn. Sed ili enhavis ne nur eltranĉaĵojn el gazetoj: ĉeestis ankaŭ pecetoj el plantaĵoj, kaj rubandoj, konkoj, kaj skulptitaj pecetoj el ligno, kiujn li instruis al la maristoj fari por li; kaj ili estis belege ilustritaj. Li pentris admirinde, kaj havis en tiuj libroj kelke el la plej humoraj kaj ankaŭ plej simpatigaj pentraĵoj, kiujn mi iam vidis. Mi miras pri tio,—al kiu nun apartenas tiuj ĉi libroj de elĉerpaĵoj.

Nu, li diris, ke la legado, kaj la aranĝado de liaj notoj estas lia profesio, kaj ke ili okupas, la unu kvin horojn, kaj la alia du horojn, ĉiutage. "Mia Natura Scienco estas mia amuzo." Tio okupis ankaŭ du horojn ĉiutage. La maristoj kutimiĝis alporti al li birdojn kaj fiŝojn, sed dum longa kruzo li devis kontentigi sin per diversaj insektoj. Li estis la sola naturamanto scianta ion pri la kutimoj de la

doma muŝo kaj la "mosquito" (kulo). Ĉiu naturamanto povas diri al vi, ĉu ili estas Lepidoptera au Steptoptera, sed diri kiel forigi ilin, aŭ kiel ili liberigas sin, kiam oni alfrapas al ili, neniu povas. Tiuj ĉi naŭ horoj faris la ĉiutagan okupadon de Nolan. La restaĵon de la tempo li promenadis kaj paroladis. Ĝis kiam li estis tre maljuna, li ofte supreniris sur la ŝnuraron. Li daŭris ekzerci korpe, kaj mi neniam aŭdis, ke li iam malsaniĝis. Sed se alia malsaniĝis, li estis la plej aminda zorgisto, kaj li sciis plu ol duono da la kuracistoj. Krom tio, se iu malsaniĝis aŭ mortis, aŭ se la kapitano deziris tion, li estis ĉiam preta legi preĝojn; kaj, kiel mi antaŭe diris, li legis dolĉe.

Mia propra koniĝo kun Nolan komencis ses aŭ ok jaroj post la angla milito, dum mia unua kruzo, post kiam mi estis nomita sub-oficiro. Okazis dum la unuaj tagoj de nia interkonsento rilate al la sklavvendado,—dum la "Reganta Familio," kiu estis ankoraŭ la Familio de Virginio, daŭris teni sentimentalan senton pri la submetado de la teruroj de la "Meza Transirado," kaj kiam okaze oni faris ion pri ĝi. Ni vojaĝadis en la suda parto de la Atlantiko pri tiu afero. De la tempo, kiam mi eniris la ŝipon, mi opinias, ke mi konsideris Nolan kiel pastron, pastron kun blua vestaĵo. Mi neniam demandis pri li. Ĉio en la ŝipo estis stranĝa al mi. Mi sciis, ke tiun, kiu havas demandojn, oni nomas "Verdulo," kaj eble mi pensadis, ke ĉiu ŝipo havas "viron kun neornamitaj butonoj." Li tagmanĝis kun ni ĉiusemajne, kaj oni nin avertis, ke ni ne preparolu pri hejmo tiun tagon. Sed se oni estus ordoninta, ke ni ne parolu pri la planedo Mars, aŭ pri la libro Deŭteronomio, mi ne estus demandinta la kialon. Estis multaj aferoj, kiuj unue ŝajnis al mi esti tiel malmulte raciaj.

Mi unue ekkomprenis ion pri la "Viro Senpatruja," unutage, kiam mi kaptis malpuregan ŝipeton enhavantan sklavojn. Oficiro estis sendita por kontroli ĝin. Post kelke da minutoj li resendis sian boaton por peti, ke iu, kiu povas paroli la Portugalan lingvon, estu sendata al li. Ni ĉiuj elrigardis el la ŝipbordo tiam, kiam la depeŝo alvenis; kaj ni ĉiuj tre deziris, ke ni povu traduki, kiam la kapitano demandis, "Kiu parolas Portugale" Sed neniu el la oficiroj povis tion fari. Tamen, ĵus kiam la kapitano eksendis por scii, ĉu iu el la maristoj povas traduki tiun lingvon, Nolan antaŭen paŝis kaj diris, ke li gaje tradukos, se la kapitano volas, ĉar li komprenas la lingvon. La kapitano dankis al li, preparis alian boaton por li, kaj la bonsorto estis la mia iri en tiu ĉi boato.

La tiea vidaĵo estis tiel, kiel oni malofte vi-

das, kaj neniam deziras denove vidi. Malpuraĵo senfina kaj haoso meze de la malpuraĵo. Ne estis multe da nigruloj, sed por komprenigi al la malmultaj, ke ili estas liberaj, Vaughn liberigis ilin de la manradikaj, kaj maleolaj ĉenoj, kaj pro oportuneco kontraŭigis ilin kontraŭ la ŝipanaroj. La nigruloj staris, je pli granda parto, ekstere el la ŝipinternaĵo grupiĝinte sur la ferdeko. Aro ĉirkaŭis Vaughn, alparolante al li per ĉiu idiomo kaj ŝanĝeto de idiomo, de la Zula lingvo ĝis la Pariza lingvo franca de Beledeljereed.

Jus kiam ni suriris la ferdekon, Vaughn mal-supren rigardis de la barego, sur kiu li staris kaj kriis, "Pro la amo de Dio, ĉu iu ĉi tie estas, kiu povas komprenigi ion al ĉi tiuj estaĵoj? La maristoj jam donis al ili viŝkon, sed tio ne kvietigis ilin; mi faligis tiun grandulon dufojn, sed tio ne kontentigis lin; kaj poste mi parolis la Choctaw-an lingvon al la tuta amaso, sed mi pendigis, se ili komprenus tion tiel bone kiel ili komprenis la anglan."

Nolan diris, ke li povas paroli la Portugalan lingvon, kaj tial, unu aŭ du Kroo'oj, ŝajne pli inteligentaj, estis eltrenataj el la amaso. Tiuj, oni jam eltrovis, antaŭe laboris por la Portugaloj sur la marbordo ĉe Fernando Po.

"Diru al ili, ke ili estas liberaj," diris Vaughn, "kaj diru ankaŭ, ke tiuj ĉi malbonfarintoj estas pendigotaj ĝuste tiam, kiam ni ricevos sufiĉe da ŝnuro."

Nolan "transmetis tion en la Hispanan lingvon," tio estas, li klarigis ĝin en tia Portugala lingvo, kian la Kroo'oj povis kompreni, kaj ili, siavice, al tiuj el la nigruloj, kiuj povis ilin kompreni. Tiam eksplodis multe da ĝajkrioj, da saltadoj kaj dancadoj; ili kisadis la piedojn de Nolan, kaj amase kuris al la barego por adori Vaughn, la "deus ex machina" de la afero. "Diru al ili," diris Vaughn, tre kontenta, "ke mi portos ilin ĉiujn al la Promontoro de l'Palmoj." Tio ĉi ne estis tiel bone. La Promontoro de l'Palmoj estis efektive preskaŭ tiel malproksima de la hejmoj de la plimulto da ili, kiel Rio Janiero aŭ Nova Orleanzo; t. e., ili tie estus eterne apartigataj de siaj hejmoj. Kaj ilia tradukanto, tiel bone kiel mi povis kompreni, tuj kriis, "Ah, non Palmas," kaj ekproponis senfine aliajn rimedojn kun multe da parolado. Vaughn iom ĉagreniĝis je ĉi tiu rezultato de sia donemeco, kaj demandis al Nolan tion, kion tiu diris. La gutoj ekspruĉis sur la blankega frunto de kompatinda Nolan, post kiam li kvietigis la nigrulojn kaj diris: "La Nigrulo diras 'ne Palmas,' li diras, 'reportu nin al niaj hejmoj, al niaj propraj infanetoj kaj virinoj.' Li diras, ke li ha-

vas maljunan patron kaj patriron, kiuj mortos, se ili ne lin revidos. Kaj tiu ĉi diras, ke li lasis ĉiujn siajn samfamilianojn malsanaj, kaj remis malsupren al Fernando por peti, ke la blanka kuracisto venu kaj helpu ilin; kaj ke tiuj ĉi diabloj lin kaptis, ĵus kiam li povis jam vidi sian domon; kaj ke li neniam de tiu tempo vidis iun el sia hejmo. Kaj tiu ĉi diras," kaj Nolan parolante sufokiĝis, "ke li ne aŭdis eĉ vorton de sia hejmo dum ses monatoj, dum li estis mallibera en la boato."

Vaughn ĉiam diris, ke li mem griziĝas, dum Nolan balbutas tra la tradukado. Eĉ mi, kiu ne komprenis ion pri la pasio envolvita, ekvidis, ke la elementoj mem fludiĝas per la varmego, kaj ke la doloro al iu estos granda. Eĉ la nigruloj mem ĉesis kriigi, kiam ili vidis la agonion de Nolan kaj la preskaŭ egalan agonion de Vaughn pro lia simpatio. Tuj kiam li povis paroli, li diris, "Diru al ili, Jes! Jes! Jes! Jes! Diru, ke ili iros al la Montoj de la Luno, se ili volos. Eĉ se mi devos ŝipvojaĝi tra la Granda Blanka Dezerto, ili iros al iliaj domoj." Kaj tiel Nolan faris. Kaj tiam tiuj reekkriis, kaj kisis liajn piedojn, kaj deziris froti lian nazon per iliaj.

Sed li ne povis suporti tion longatempe; kaj Vaughn, permesante al li reiri, li mansignalis al mi, ke mi akompanu lin. Kiam ni sidiĝis en la boato, kaj la boatistoj ekremis, li diris al mi; "Junulo, lasu, ke tio montru al vi tion, kion signifas esti sen familio, sen hejmo, kaj sen patrujo. Kaj se vi estos iam ajn tentata diri eĉ vorton aŭ fari ion ajn, kio starigos barilon inter vi kaj via familio, via hejmo kaj lando, preĝegu al Dio, ke li bonvolu alpreni vin en tiu momento mem al sia propra ĉielo. Ne forlasu vian familion, junulo. Forgesu, ke vi mem ekzistas, dum vi faras ĉion por ili. Penu pri via hejmo, knabo, skribu al ĝi, sendu donacojn al ĝi, parolu pri ĝi. Premu ĝin pli kaj pli proksime al via penso, kiel pli kaj pli malproksime de ĝi vi forvojaĝos, kaj rapidegu ree al ĝi, kiam vi havos kelke da libertempo, kiel tiu nigra sklavo estos rapidanta hodiaŭ. Kaj por via lando, knabo," kaj la vortoj krakis en lia gorgo, "kaj por tiu standardo," kaj li mansignalis al la ŝipo, "neniam ŝonĝu pri iu krom servado al ĝi, kiel ajn ĝi komandos, eĉ kvankam la devo kondukos vin tra mil inferoj. Ne signifas tio, kio okazos al vi, ne tiu, kiu flatos aŭ mokos vin, neniam rigardu al alia standardo,—neniam lasu nokton foriri, en kiu vi ne preĝeĝos al Dio, ke li benu tiun stardardon. Ne forgesu, knabo, ke malantaŭ la oficiroj kaj ŝtato-kaj eĉ la popoloj estas la Lando mem, via Lando, kaj ke vi apartenas al ĝi tiel, kiel vi apartenas al via propra patrino. Subtenu ĝin,

knabo, ĝuste tiel, kiel vi subtenus vian partinon, se tiuj jenaj diabloj kaptus ŝin hodiaŭ.”

Lia kvietata, glacia pasio timigis min, preskaŭ al la morto, sed mi povis elbalbuti, je ĉia sanktaĵo, ke mi tiel faros, kaj ke mi neniam pensos fari alie. Li ŝajnis preskaŭ min ne aŭdi, sed li diris, preskaŭ murmure, “Ho, se iu tiel estus dirinta al mi, kiam miaj jaroj egalas al la viaj.”

Mi pensas, ke estis tiu ĉi duonkonfido, al kiu mi neniam estis nefidela (ĉar mi nun rakontas tiun ĉi historion unufoje), kiu nin tiel amikiĝis. Li ĉiam restis afabla al mi. Ofte li ne kuŝiĝis, aŭ eĉ leviĝis, por povi promeni sur la ferdeko kune kun mi dum mia gardotempo. Li klarigis al mi grandan parton da mia matematiko, kaj ja mi ŝuldas al li mian kliniĝon al matematiko. Li pruntedonis al mi librojn, kaj helpis mi pri mia legado. Li neniam denove aludis tiel rekte sian historion, sed de unu aŭ alia oficiro mi sciigis, dum tridek jaroj, tion, kion mi nun rakontas. Kiam mi disiĝis de li en Sankta Tomasa Haveno, mi bedaŭris ĝin pli ol

mi povas diri. Mi, je mia plezuro, renkontis lin denove en 1830; kaj kiam mi estis pli maljuna, kiam mi opiniis, ke mi havas iom almenaŭ da influo ĉe la “Departamento” ĉe Washington, mi faris ĉion, por ke li ricevu sian malliberiĝon. Sed ĝi similis al la malliberiĝado de fantomo. Oni pretendis, ke ne estas tia viro; kaj efektive neniam estis. Eble oni tiel diras ĉe la “Departamento” nun. Ne estas tiu ĉi la unua afero, pri kiu la “Departamento” ŝajnas scii nenion.

Stariĝis rakonteto, ke Nolan renkontis Burr en unu el niaj ŝipoj, kiam kelkaj amerikanoj vizitis ĝin sur la Mezararo. Sed mi firme kredas, ke tio ĉi estas mensogo; aŭ pli bone, ĝi estas fablo, enhavanta vortan eksplodegon, per kiu li renversis Burr'on, demandante al li, kiel li ĝin ŝatas, esti “sen patrujo.” Sed estas tute klare, laŭ la historio de Burr, ke tia afero ne povis okazi, kaj mi atentigas vin al tiu ĉi rakonto, nur kiel al ekzemplo el la historietoj, kiuj ĉiam sin disvastigas, kiam ajn funde estas la plej malmulte da misterio.

(FINO.)

NIA NOMO

Rilate al la adjektivo “Amerikana,” la popolo de la Unuigitaj Ŝtatoj aprobas ne alian adjektivon por aludado al si mem aŭ al sia lando. Tiu-ĉi vorto, en la limigita nacia signifo “rilatanta al la Unuigitaj Ŝtatoj,” estas permesata pro internacia uzado.

En Esperanto, internacieco estas la ĉefa regulo por la elektado de radikoj. Nu, Esperanto havas la ĝeneralan radikon “Amerik.” La kutimo permesu, ke oni ekmontru *adjektive* la kontinenton per “Amerika,” kaj nian nacion per “Amerikana”: jen Peru estas Amerika Ŝtato; Texas estas Amerikana Ŝtato; Amerika kreskaĵo; Amerikana (Unuigitaj Ŝtatoj) poeto.

Ankaŭ oni povas havi la vorton *Amerikanlando* anstataŭ la malpli facile parolata nomo “Unuigitaj Ŝtatoj.”

Por loĝanto sur la Amerika kontinento oni apenaŭ bezonas vorton, ĉar la rasoj estas multaj: tamen oni povas uzi por tiu-ĉi la vorton “Amerikulo.”

Thomas Hunter (A. E. 102).

LA DUA PSALMO (el la Hebrea)

Kial tumultas la nacioj, kaj kial la popoloj paroletadas vanaĵojn? Sin firmigis reĝoj de tero kaj gravuloj kune konsiliĝis kontraŭ Jehovo kaj lia Mesio. “Ni deŝiru iliajn konsilojn kaj forĵetu de ni iliajn ŝnurojn.” La sidanto en la ĉielo ridos; la Sinjoro mokegos je ili. Tiam li diregos al ili en sia kolero, kaj en sia furiozo terurigos ilin.—“Kaj mi estas fiksiganta mian reĝon sur Zijono, mia sankta monto.”

“Mi skribos pri dekreto: Jehovo diris al mi, ‘Mia filo estas ci; mi hodiaŭ cin naskis.’ Demandu al mi, kaj mi donos naciojn por cia heredaĵo kaj por cia posedo finaĵojn de la tero. Ci rompos ilin per sceptro de fero; kiel vazo de potisto ci frakosas ilin.”

Kaj nun reĝoj prudentiĝu; estu instruitaj, juĝistoj de tero. Servu Jehovon kun timo, kaj ĝoju kun tremado. Ekkisu la purulon, ke li ne koleriĝu kaj vi ne perdiĝu voje, ĉar ekbrulos subite lia kolero. *Feliĉa ĉiu rifuĝanto en li.*

Am. Esp. 49.



International Reviews printed *only* in Esperanto

- Internacia Sciencia Revuo* (International Scientific Review).....\$1.50
- La Revuo*—literary monthly.....\$1.40
Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, France.
- Tra la Mondo*—illustrated monthly.....\$1.60
“Gazeto Tra la Mondo,” Meudon (S. et O.), France.
- Lingvo Internacia*—twice a month—with 300 pages of literary supplement annually.\$1.50
“Presa Esperantista Societo,” 33 rue Lacépède, Paris, France. (Postal Money Office, 29 rue Monge.)
- Espero Pacifista*—International Peace Magazine\$1.00
Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly sur Seine, France.
- Espero Katolika*—Roman Catholic Monthly.....\$1.00
Abbé Em. Peltier, Ste. Radegonde près Tours (I. et L.), France.
- Printed in Esperanto and in one of the modern languages. Subscription price \$0.80*
- British Esperantist*—British Esperanto Ass., 13 Arundel St., Strand, London W. C., Great Britain.
- L’Esperantiste*—Administration de L’Esperantiste, 4 rue du Gril, Louviers (Eure), France.
- German Esperantist*—Verlag Moeller und Borel, Prinzenstrasse 95, Berlin, S., Germany.

Sample copies of the above mentioned magazines can usually be obtained from the American Esperanto Association; prices, one-tenth of year price.

Please send subscriptions by U. S. POSTAL or EXPRESS ORDERS to the Treasurer of the American Esperanto Association, Tenafly, N. J.

Esperanto: Auxiliary International Language

300 ORGANIZED SOCIETIES—20 JOURNALS

Supported and endorsed by many prominent men in Europe, Asia and America. London Chamber of Commerce holds regular Esperanto examinations.

For general information, for addresses of Esperanto magazines (Russian, Japanese, Polish, Swedish, etc.) and societies, for books, etc., write to the

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

BOULEVARD STATION, BOSTON, MASS., U. S. A.

- Bullen’s Lessons.....\$0.26
- Descriptive booklet, pamphlets, etc......10
- Krestomatia (standard for style), paper 1.00
- “ “ “ cloth 1.40
- American Esperanto Journal, sample copy10

Send for price-list; all profits are spent for the advancement of the Esperanto “cause.”

Special Cable Dispatch to the SUN, London, March 16th—"The Chamber of Commerce has adopted Esperanto as a recognized language."

ESPERANTO LITERATURE

"IT will bring to the reader a startling sense of the feasibility of universal language. Esperanto is a miracle of simplicity. Almost any day, speaking loosely or figuratively, it may dawn upon the consciousness of the business world as a revelation. It is even conceivable that Esperanto should ride into world success on the tide of an Anglo-American fad."—*Chicago Evening Post*.

Esperanto Student's Complete Text

Book Containing full grammar, exercises, conversations, commercial letters and two vocabularies. By J. C. O'CONNOR, B.A. Revised edition of 1907. Cloth, 50c. net.

English-Esperanto Dictionary

By J. C. O'CONNOR and C. F. HAYES. Boards, 60c. net.

Esperanto-English Dictionary

By A. MOTTEAU. Boards, 60c. net.

Lessons in Esperanto

Compiled by GEO. W. BULLEN. Paper Covers, 25c. net.

A Primer of Esperanto 10c. net.

A First Reader

Compiled by E. A. LAWRENCE. 25c. net.

Handy Pocket Vocabulary

Compiled by J. C. O'CONNOR, B.A., LL.D. Paper, 10c. net.

Christmas Carol Paper, 40c. net; Cloth, 60c. net.

The Whole of Esperanto and the means of learning it without lessons by reading a little story. Paper binding, postpaid, 5c.

SEND FOR CIRCULARS

FLEMING H. REVELL COMPANY, Publishers

NEW YORK: 158 Fifth Avenue

CHICAGO: 80 Wabash Avenue

"MI AUDAS VIN"

La unua kanto Esperanta eldonita en la U. Ŝ.:
muziko de Sro. Herbert Harris; poemo de Dro.
Leono Zamenhof. Facila por meza voĉo.

PREZO: FR. 1.75 (35 CENTS);

5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

American Esperanto Association

Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A.